



Kulturaj Kajeroj

É. MAMÉ →

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Francilingvaj Esperantistoj

JARABONO

Jarabono : 70 fkoj

P. BABIN

Le Haut des Bourrelières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K Nantes : 2.813.61 L

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1992 — 1

(JANUARO-FEBRUARO-MARTO)


EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... la malkovro de Ameriko...

I. SPIGEL DER KVNST VND NATVR



... kaj pri la Renesanco de Alkemio

KULTURAJ KAJEROJ

Trimonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario : Jeannine VINCENT
26 bis, rue de Milngavie, 49150 BAUGE

Komitatanoj :

Pierre Babin
Simone Guillot

ENHAVO

	paĝo
El Grésillon	1
Tra la Mondo (A. Frangeul)	2
1492 ? (laŭ Louis Kervran)	3-4
Alkemio (Bernard Golden)	5-7
Pri Hundoj	8
La blinduloj kaj Esperanto (Boniol)	9-11
Sinjoro Lernejestro (E.B.)	12-13
Por via distro	14
La Vivo en Grésillon	15-16

El Grésillon

En 1992, kiel ĉiun duan jaron, okazos voĉdonado por la elekto de duono el la komitatanoj. Ĉar la ĝenerala kunveno okazos la 16-an de majo, la novaj kandidatoj bonvolu konigi sin antaŭ la 20-a de aprilo. Estas dezirinde, ke pluraj geamikoj kandidatiĝu por daŭrigi la "plijunigon" de la komitato.

La printempa Internacia renkonto de infanoj anonciĝas pli sukcesa ol la kelkajn antaŭajn jarojn. Proksimume 50 partoprenontoj aliĝis ĝis la 20-a de marto, el kiuj almenaŭ 30 geknaboj. El Ĉeĥoslovakio vojaĝos Grezizonon sep ĉeĥaj knabinoj.

La aliĝoj por la someraj stud-periodoj alvenas regule, ĉefe el eksterlando. Ĉar,

ĉefe el eksterlando. Ĉar la Francoj, kiel kutime atendas la monaton majo por informi nin pri sia intenco ĉeesti iun periodon. Ili tamen rapidu por esti certa rezervigi la deziratan loĝejon.

Antaŭ la oficiala malfermo de la Somera Periodo de la Esperanto-Domo (24-06) Grésillon akceptos grupon ne-esperantistan de proksimume 60 personoj, emeritajn geinstruistojn, kiuj laboras por homama organizaĵo.

NI FUNEBRAS

Ni ĵus eksciis, ke bona amiko de Grésillon kaj de nia revuo malaperis: Calixte Cavalié mortis. Li forlasis sian familion, siajn amikojn kaj ankaŭ sian valoran poresperantan laboron. Ni lastfoje, elkore salutas lin kaj kondolencas lian familion.

Esperanto tra la Mondo



LA UNIVERSALA KONGRESO EN VIENO-

La temo de la kongreso estos: "Kiam falas muroj de miljaroj: komuna eŭropa domo". La temo de la 15-a esperantologia konferenco estos: "Esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj". Aperis serio de belaj grandformataj afiŝoj pri la kongresa urbo. La antaŭkongreso okazos en Prago, de la 19-a ĝis la 25-a de julio.

LA KONGRESO DE S.A.T- La francoj, kiuj deziras iri al la kongreso de S.A.T. en Kaunas (Litovio), 5-15a de aŭgusto, povas sin turni al la asocio Esperanto-Turismo, 31, rue des Prés, 68170 Rixheim, kiu zorgas pri tiena perbusa vojaĝo.

ALIAJ RENKONTOJ- Somera internacia renkonto, ĉe mediteranea marbordo, en Sète, 12-19a de septembro 1992. Informas: Centre Culturel Esperanto, 5, rue du Dr Roux, 34000 Montpellier.

Semajnfino kun diversaj esperanto-kursoj, la 16-17an de majo, ĉe la atlantika marbordo, en Pornichet. Informas Janine Vince, "Hejme", Rue du Dr Bichat, 44600 St Nazaire.

1-a Pekina Internacia Simpozio pri aplikado de esperanto, 9-15a de majo, en Beijing. Informas: PISAE, P.O. box 1089, Beijing, CN-100034.

Kongreso por pliaĝuloj, 5-12a de septembro en Aŭgsburgo (Germanio). Informas: B.E.L., Waterloostr.21, D-W-9800, Augsburg, Germanio.

DATREVENO DE LA MORTO DE ZAMENHOF-

Okaze de la 75a datreveno de la morto de Zamenhof, la radia stacio "France-Culture" preparis kvin intervjuojn, sub la gvidado de la ĵurnalistino Cécile Descubes, de la 13a ĝis la 17a de aprilo, de la 10-40a horo ĝis la 11a, kun, sinsekve, la partopreno de kvin konataj esperantistoj: Pierre Janton, Claude Piron, Claude Gacond, Michel Duc-Goninaz kaj Henri Masson, en la kadro de la rubriko: "Les chemins de la connaissance" (la vojoj al kono).

LA ESPERANTAJ BIBLIOTEKOJ- La tri plej grandaj bibliotekoj de esperanto estas la biblioteko Hector-Hodler, en la sidejo de UEA, en Roterdam, la biblioteko de la Internacia-Muzeo en Vieno kaj la biblioteko de la Esperanto-Asocio en Britio;

En la Chaux-de-Fonds (Svisio) estis fondita en 1967, kiel aparta fako de la urba biblioteko, la Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Lingvo Internacia kaj aliaj projektoj de internaciaj lingvoj.

En Francio, la restadejoj de Grésillon kaj Bouresse ankaŭ disponas pri multe da libroj. La "Kvinpetalo" de Bouresse ĵus heredis la bibliotekon de prof. Waringhien.

Ni ankaŭ memorigas, ke en la urbeto Gray, oni povas viziti la francan nacian esperanto-muzeon. Rilati kun la direktoro: Geo. Junier, 67bis faubourg des Perrières, tel: 84 65 11 73.

ESPERANTO-EKZAMENOJ- EN FRANCIIO-

La Franca Esperanto-Instituto daŭrigas la renovigon de la ekzamen-sistemo. Nova unuagrada ekzameno (Atesto pri Lernado) validas jam de la 1-a de oktobro 1990. La nova Atesto pri Praktika Lernado (duagrada ekzameno) ekvalidos la 1-an de oktobro 1992. La organizantoj de la ekzamen-sesioj ne rajtas mem verki la ekzamentekstojn. Ili devas nepre ilin peti de la direktoro de la ekzamencentro: François Lojaco, 21, rue Juliette-Dodu, 75010 Paris, minimume ses semajnojn antaŭ la dato de la ekzameno.

ĈE LA FRANCAJ EDUKISTOJ- La sekcio Esperanto de la "Freinet-movado" (ICEM), en Francio, redaktis specialan numeron de la revuo "Le Nouvel Educateur" dediĉita al la internacia lingvo. Informas: Henri Ménard, 1, rue Galissonnière, 44330 Le Pallet.

1492 ?

Tre verŝajne, kiuj ankoraŭ ne sciis, ke Kristoforo Kolumbo malkovris Amerikon en 1492, tiuj estos informitaj antaŭ la fino de la nuna jaro; skribaj kaj parolaj informiloj zorgas pri tio. Ĉiuj scios, ke kiam Kolumbo forveturis de Palos la 3-an de aŭgusto, 1492, komisiita de Izabela de Kastilio, meze de vasta diskonigo, por trovi novan surmaran vojon al Hindujo, li alboridiĝis sur insuloj. Nur la trian fojon, en 1498, li alboridiĝis sur la kontinento. Ĉu la unua li alvenis tie el orientaj landoj? Jesaj, neaj respondoj, pli malpli nuancitaj estas faritaj. Kial Kulturaj Kajeroj ne rajtus almeti sian "saleron" en la "inform-poton"?

Sistemaj esploroj certigis la alboridiĝon de Vikingoj sur la orienta bordo de Nord-Ameriko jam dum la X-a jarcento, verŝajne kaŭze de vento-puŝoj. De post la fino de la 19-a jarcento multaj literaturaj verkoj kaj gazet-artikoloj temas pri la "amerika periodo" de la Vikinga historio. Rakontoj, mapoj ŝajne pruvas, ke oftaj, senreklamataj transmaraj vojaĝoj inter Eŭropo kaj Ameriko okazis mil jarojn antaŭ la veturo de Kolumbo. Kial estis diskonigitaj la faroj de Kolumbo, ne tiuj de la maristoj de Irlando kaj Bretonio? Ĉu ĉar tiuj lastaj celis nur fiŝkaptadon ne konkeradon kaj komercadon, kaj ne estis devigataj serĉi "mecenatojn"? Iom poste venis Amerikon monaĥoj por konigi kristanisman al la "kontaktitaj" popoloj.

En siaj "Memoraĵoj" la filo de Kolumbo skribis, ke antaŭ sia unua vojaĝo, lia patro iris al Bretonio, precize en insulon Bréhat, ĉar tie la maristoj tre bone konis la marvojojn al Okcidento, ventojn kaj fluojn. En 1440 jam, estis ediktata ĉarto de la franca reĝo rajtiganta la abatejon de Kéridy, apud Paimpol, norda Bretonio, kolekti impostan dekonaĵon pri ĉiuj varoj venantaj de la maro kaj de la landoj transoceanaj, verŝajne ĉefe fiŝo.

Ĉu la Keltoj malkovris la amerikan kontinenton eĉ antaŭ la Vikingoj? Multaj norvegaj, groenlandaj kaj islandaj sagaoj transskribitaj fine de la 12-a jarcento aludas pri la ĉeesto de Keltoj en Ameriko kaj pri iliaj oftaj transoceanaj vojaĝoj. La plej malnova sagao estas tiu de Ari Marson, ekveturinta de Islando en 983 kaj forpuŝita de la ventegoj ĝis nekonata landobordo. Tie li renkontis blankulojn, kiuj parolis la gaelan lingvon. Li estis kontraŭvole baptita kristano. Pli poste Karlsefni, islanda nobelo, kaj lia edzino, renkontis indiĝenojn estritajn de Keltoj, eĉ iun barbulon kun du virinoj kaj du infanoj. Alkondukitaj al Norvegio, tiuj infanoj rakontis pri procesioj de blankvestitaj personoj. Ĉu temis pri Keltoj forveturitaj de Irlando, kiam, dum la 9-a jarcento, tien alvenis la vikingaj invadantoj? Ankaŭ la vaticanaj arĥivoj estas tiuteme interesaj. Papo Inocento la 3-a (11-a jarcento) rimarkigas, ke la episkopo de Groenlando ne regule pagas la ŝulditajn denarojn. Dum la 14-a jarcento Inocento la 4-a petas la reĝon de Norvegio prepari milit-intervenon por "rememorigi pri iliaj devoj la Groenlandajn kaj Nord-amerikajn kristanojn". La nord-amerika kontinento estis do konata de Vatikano jam antaŭ la vojaĝo de Kristoforo Kolumbo.

Ne nur arĥivoj kredigas pri la ĉeesto de Keltoj en Nord-Ameriko. En la regiono de Boston, kie printempe kaj somere la ventoj blovas favore al ŝipoj venantaj de Oriento, oni trovas keltsimilajn arkitekturaĵojn. En Newport iu turo mirigas arkeologojn. Unu el ili priskribas ĝin jene: "Ĝi similas fortreson. Oni povas aliri la superajn etaĝojn nur tra pordo, kies sojlo situas je pli ol 4 metroj de la grundo-nivelo, kaj nur helpe de ŝtupetaro facile suprenlevebla per ŝnuro". Tiu priskribo montras, ke tiu turo tute similas tiun de Clonmacnois en Irlando, aŭtente kelta. Simila turo staras ankaŭ en Lanleff, Bretonio. Ĝi estis parto de monaĥa priorejo. Tiu tipo de ronda preĝejo, kies

ŝtonoj estas kunigitaj per cemento el sablo, kalkaj marŝeloj kaj kalcinita argilo, ne plu estis konstruita post la XI-a jarcento. Sed en 918 la monaĥoj de Lehon, abatejo al kiu la priorejo de Landeff estis ligita, forveturis transoceanen, pro timo de invado de la Vikingoj. Eble ili mem konstruis la turon de Newport por alfronti alvenon de Vikingoj inter 1003 kaj 1015.

Alia usona arkeologo skribas pri alia monumento troviĝanta en North Salem: "Ĝi memorigas pri iuj ĉre malnovaj ŝtonaj konstruaĵoj de Islando, Skotlando kaj Bretonio". Ĝuste oni povas kompari la monumenton de North Salem kun la Sanktejo Sep-Sanktuloj, en la komunumo de Vieux-Marché (Malnova Vendoplaco) en la Bretonia departemento "Armor Marbordo".

Post kvar jarcentoj da fermiteco, pro internaj kvereloj, Eŭropo malfermiĝis al la mondo. Tio gravas. En la 15-a jarcento Kristoforo Kolombo verŝajne reaktualigis malnovan, eble perditan, tradicion. En 1364 la Venecia ŝipekipisto Zeno, veninte komercocele al Islando, skribis al siaj fratoj pri eksterordinara novaĵo: maristo rakontis al li pri sia 26-jara restado en "Nova Mondo". Kristoforo Kolombo disvastigis sur la oceano, ĝis Ameriko, la spiriton de la Nova, 15-a jara Eŭropo: spirito de konkerado, komerco, imperialismo. Verŝajne la motivoj de la maristoj kaj monaĥoj de la Mezepoko estis malsamaj. Pro tio la historio kolektis nur kelkajn erojn el ilia eksterordinara aventuro.

El artikolo de Louis Kervran



Gaston Waringhien mortis

Kun prof. Gaston Waringhien, kiu mortis la 20-an de decembro, malaperis ne nur unu el la gigantoj de la esperanto-movado sed ankaŭ unu el la arkitektoj de nia lingvo. Malaperis ankaŭ kun li multifaceta talenta verkisto: kunaŭtoro de Plena Ilustrita Vortaro kaj de Plena Analiza Gramatiko, aŭtoro de "Grand Dictionnaire esperanto-français", mistera, brila poeto G.E. Maura de "Duonvoĉe", kaŝita kunaŭtoro (G. Peterido Peneter!) de "Libro de Amo", Gaston Waringhien, por nia klerigo kaj ĝuo, liveris al ni la mirindan eseon serion: "Beletro", "Lingvo kaj Vivo", "Ni kaj ĝi", k.t.p.

La kvar dulingvaj libroj "Tra la parko de la franca poezio" estas aparta literatura monumento

sed oni povas citi ankaŭ la tradukojn de "La Robaĵoj" de Omar Kajam, de noveloj de "La Dekamerono", de "La Maksimoj" de La Rochefoucauld, de la "Floroj de l'malbono" de Baudelaire, de "Kantoj kaj Romancoj" de H. Heine (tiuj du lastaj en kunlaboro kun Kalocsay), la prezentadon de la leteroj de Zamenhof, sen paroli pri la redaktado de multaj prefacoj kaj artikoloj.

Ni esperu, ke niaj grupaj kaj privataj bibliotekoj daŭre kolektos tiujn trezorojn de nia lingva kulturo kaj ke tiuj libroj estos legataj de la novaj generacioj de esperantistoj.

André Frangeul

ALKEMIO

BAZAJ SCIOJ- Dum multaj jarcentoj kaj en pluraj kulturoj ekzistis pseŭdoscienco nomata la alkemio, kies celo estis plenumi la plej grandajn dezirojn de la homaro. Per alkemiaj procedoj oni provis produkti oron, metalon, kies altirforto estas senegala en la mondo: Helpe de la alkemio oni serĉadis panaceon, kiu kapablas kuraci ĉiujn malsanojn. Fine, la alkemio donis esperon al multaj homoj trovi rimedon por akiri eternan vivon. Ne estis alia scienco aŭ arto, kiu tiom ofertis - riĉecon, sanon kaj senmortecon - ĉion en unu fojo! Estus vere mirinde, se ne troviĝus entuziasmaj praktikantoj de la alkemio en la pasinteco kaj ankaŭ hodiaŭ!

La historio de la scienco instruas, ke post la evoluo de metodoj de racia esplorado, kiuj sukcesis objektivigklarigi naturajn fenomenojn, la alkemio estis eklipsita. Ĝi ne kontribuis al la disvolvo de la moderna kemio, kiu havas siajn radikojn en la paralele evoluanta iatrokemio, t.e. la farmacio, kiu utiligis kemiajn substancojn por la kuracado de malsanoj. Rezultis, ke la alkemio estis sakstrato, kiu, tamen, neniam estis tute forbarita, ĉar kelkaj adeptoj, jen sekrete, jen malkaŝe, dediĉis sin al eksperimentado en la 19-a kaj frua 20-a jarcentoj.

Aktuale estas videblaj signoj de - por tiel diri - renesanco de la malnova arto. Ne plu estas sentebla ĉe la nuntempaj alkemiistoj iu bezono gardi sekretajn teoriajn procedojn kaj laboratoriajn rezultojn de eksperimentoj. Sekve, krom la publikigo de libroj aperas ankaŭ revuoj okupiĝantaj pri la alkemio, kiel "Ambix", "Chymia", "Isis" kaj "Janus". Fakte la alkemio estas nur unu el la t.n. okultaj sciencoj, kiuj lastatempe fariĝas tre popularaj. Menciindas la astrologio, kartomancio (kartaŭgurado, precipe per tarok-kartoj), oneiromancio (sonĝ-interpretado) kaj kiromancio (mandivenado). La kialo estas konfuzo kaj necerteco

hodiaŭ pro malstabilaj politikaj kaj sociaj cirkonstancoj plurloke en la mondo, al kiuj aldoniĝas ekonomiaj problemoj kaj krizoj. La homo nun, same kiel en la pasinteco, volas trovi manierojn ekscii, kio okazos estontece, kaj por akiri tiun scion ne gravas, se li neracie retropaŝas en la obskuran antaŭsciencan epokon.

PROFITDONA HOBIO- Krom esti interesa historia studo kaj agrabla okultscienca tempopasigo aŭ hobio, la alkemio ankaŭ hodiaŭ allogas homojn, kiuj estas avidaj je materiaj profitoj. La malbona ekonomia stato de pluraj landoj pelas multajn al serĉado de diversaj manieroj havigi al si rimedojn por plenigi la poŝojn kaj bank-kontojn. Unu el la plej videblaj kaj tuŝeblaj formoj de riĉeco havas la formon de oro. Vere, ora fadeno trairas la tutan historion de la homaro, kaj estas ĝuste la alkemio, kiu havas kiel primaran celon la produktadon de oro per transmutacio de malnoblaj metaloj. Ne nur ordinaruloj senĉese serĉis la flavan metalon; ankaŭ ŝtatestroj, neniam havantaj sufiĉajn monrimedojn, en tempo de krizoj ne hezitis esplori plej bizarajn teknikojn por pligrandigi la kvanton da oro en la Trezorejo.

La scenejo de unu el la sekretaj orproduktaj projektoj en la 19-a jc. estis la imperiestra palaco en Vieno. En 1867 Francisko Jozefo la Unua dekrete akceptis la proponon de tri fremlandaj alkemiistoj transformi arĝenton je la valoro de kvin milionoj da forintoj en oron valorantan 80 milionojn da forintoj. Profesoro en la teknika universitato estis nomumita por kontroli la procedon, sed la provo ne sukcesis.

Post la unua mondmilito la venkita Germanio alfrontis senesperan ekonomian situacion pro la deviga pago de milit-reparacioj je la valoro de 50 tunoj da oro. Akcepteblaj estis ĉiuj proponoj produkti pli da oro. Ĉi-rilate famon akiris Fritz Haber, ricevinto de la Nobel-premio pri kemio en 1918, kiu en 1920 ellaboris procedon ekstrakti la orenhavyon de marakvo. Lia eksperimento fiaskis, ĉar la koncentriĝo de oro en la maro estas malpli

granda ol oni ĝis tiam opiniis. Sekve la grandaj ŝuldoj ankoraŭ pezis sur la ŝtata Trezorejo. Tiam, samjare prezentis sin al la germana ĉefstabo viro, kiu proponis fari oron per alkemia procedo. Li estis akceptita kun etenditaj brakoj, kaj fabriko estis konstruita por li, kiun financis la Trezorejo.

Eble la lasta fama ŝtatestro, kiu okupiĝis pri la produktado de oro, estis Adolf Hitler. Onidire li dungis orfarantojn kun la espero, ke alkemiaj procedoj povos alporti rimedojn por pliriĉigi la Trezorejon de la nazia Germanio.

Antaŭ ol sekvi la paŝojn de la alkemiistoj, kiuj priskribis, kiel akiri la ŝtonon de la filozofoj, estas utile alproprigi kelkajn esencajn nociojn pri tiu arkana arto. Alkemiistoj plenumas sian laboron konforme al du fundamentaj principoj, kiuj servas kiel la bazo de ilia sistemo. Temas unuflanke pri la teoria konsisto de metaloj kaj aliflanke pri la maniero produkti metalojn. Ili premias, ke la metalojn konstituas malsamaj substancoj; ĉiu metalo enhavas sulfuron kaj hidrargon, kiuj laŭ diversaj proporcioj prenas la formon de oro, arĝento, kupro, ktp.

Ankoraŭ unu baza koncepto estas, ke la materio estas unueca sed multforma. Laŭ alkemiistoj, ne ekzistas fenomeno kiel neorganika substanco; ĉiu materialo estas dotita per vivo. Ankaŭ la metaloj estas vivantaj en la sama maniero, kiel la animaloj kaj vegetaloj. Ili evoluas en la sino de la tero de neperfekta stato de ŝanĝebla metalo al stato de perfekta metalo, t.e. arĝento kaj oro. La procezo atingas sian finon, kiam ĉiuj transformiĝas en oron. En la alkemio ŝanĝoj ĉiam estas pozitivaj kaj neniam rezultigas degeneradon kun la escepto de meza stadio en procedo havanta favoran finon. Ĉio ĉi estas nur teorio, kaj por demonstrado estas necese plenumi transmutacion. Ekde la 12-a jc. alkemiistoj emfazis, ke por transmutacio estas necesa iu magia efikanto (en la moderna kemia faklingvo temas pri fermentigilo aŭ katalizanto) por akceli la ŝanĝojn. Tiu potenca rimedo estas la fama

ŝtono de la filozofoj.

LA PROPŬRECOJ DE LA ŜTONO DE LA FILOZOFOJ

En la termino "ŝtono de la filozofoj" (latine, Lapis philosophorum), la vorto philosophus karakterizas tiun grupon de alkemiistoj, kiuj sur teoria bazo esploras la manieron fari oron. Aliaj ekvivalentoj estas "universala tinkturo", "eliksiro" kaj "kvintesenco". Kelkaj aŭtoroj skribas pri "orfaranta pulvoro", "mirakla pulvoro" kaj "pulvoro de la filozofoj aŭ saĝuloj". Tio implicas, ke ĝi ne estas ŝtono sed speco de pulvoro, kiu ne nur transformas metalojn sed servas ankaŭ kiel panaceo aŭ universala medikamento. Kiam la ŝtono de la filozofoj tuŝetas fluidajn metalojn en la forno de alkemiisto, ili ŝanĝiĝas en oron. Tiu efiko reliefigas ĝian neorganikan karakteron; ĝi estas ŝtono, kiu ne estas ŝtono. Pro tio ĝi kelkfoje estas nomata "medikamento" por rektifado (per redistilado) de malnoblaj aŭ malsanaj metaloj.

La koloro de tiu ĉi mirakla substanco estas malsame priskribita fare de diversaj aŭtoroj. Laŭ Paracelsus ĝi estas solida kaj malhelruĝa; Berigard el Pizo skribis, ke ĝi estas skarлата; Raimundus Lullus rimarkis, ke la koloro estas helruĝa, simila al karbunkolo; Helvetius asertis, ke ĝi estas intense flava. Akordigis tiujn kontraŭdirojn la araba alkemiisto Khalid: "Tiu ĉi ŝtono kunigas en si ĉiujn kolorojn: blankon, ruĝon, flavon, ĉielkolorojn kaj verdon." Ĉiu alkemiisto pravis!

ALKEMIA RECEPŬO POR LA ŜTONO DE LA FILOZOFOJ- Por entrepreni la

opus majus, t.e. la plej grandan laboron, kiu estas la farado de oro, alkemiistoj strebas akiri unue la ŝtonon de la filozofoj, ĉar nur ĝi povas certigi riĉecon, sanon kaj povon super la naturo. "Adeptoj" estas la titolo, kiun ricevas alkemiistoj; kiuj posedas ĝin kaj kiel membroj de la alkemia fratularo, ili kutimis ligi sin per ĵuro de sekreteco. Tamen, lastatempe pluraj adeptoj agnoskis, ke jam estas tempo forigi de la malnovaj traktatoj la kriptajn rimedojn, kiujn oni uzis por konfuzi

kaj malkuraĝigi tiujn, kiuj avidis oron kiel fonton de persona povo. Pro tio kelkaj alkemiaj receptoj jam estis publikigitaj kaj klarigitaj. Sekvas priskribo de unu el la plej okulfrapaj manieroj produkti la ŝtonon de la filozofoj.

PREPARO DE LA "MATERIA PRIMA"

Unue estas necese prepari la substancon, el kiu la ŝtono de la filozofoj povas esti konsistigita. Oni opinias tiun ĉi paŝon la plej malfacila, ĉar la primara materio necesigas kunligon de du elementoj, antimono (Sb) kaj fero (Fe) kaj fine ilian fandon kun oro mem. Ĉar ne ekzistas erco enhavanta la du metalojn, erco-fragmentoj de aliaj mineraloj devas esti kunfanditaj. Eblas uzi jenajn du: feron en la formo de ercoj $Fe_2 O_3$ (ferika

oksido aŭ hematito) aŭ fera sulfido (pirito), kaj antimonon en la formo de erco $Sb_2 S_3$ (Antimonika sulfido aŭ stibnito). La kunfando donas nepuran metalan produktaĵon, kiun minejaj fakuloj nomas reguluso. Parto de la reguluso, miksitita kun egala kvanto da oro kaj iom da printempa roso, estas pulvorigita en pistujo kaj poste hermete enfermita en flakonon kune kun la sekreta fajro, nomata latine Ignis Innaturalis "nenatura fajro". La ujo, en kiu troviĝas la ingrediencoj, nomiĝas Ovum philosophorum "La ovo de la filozofoj", ĉar ĝi enhavas plurajn substancojn same kiel natura ovo. Alkemiistoj karakterizas la sekretan fajron, kiel "sekan akvon, kiu malsekigas la manojn" kaj, kiel "fajron brulantan sen flamoj". Manke de la Ignis Innaturalis, oni proponas anstataŭigi ĝin per klorhida acido (HCl). La flakono estas zorge varmigita, kaj se ĉio iras bone, la miksaĵo akiras eskvizite verdan koloron, konatan en la alkemio, kiel la Verdano leonon.

DUA FAZO- Dum la reakcio antaŭeniras, ĝi fariĝas laŭgrade violenta, kaj la Verda Leono elverŝas sian sulfuron kaj hidrorgan principojn. En la alkemia faklingvo, la termino "principo" (latine principium) estas

la nomo de la primitivaj substancoj, el kiuj konsistas ĉiuj substancoj, do en tiu ĉi kunteksto ne temas pri la ordinara hidrargo kaj sulfuro sed pri la spirito aŭ animo, kiu enestas en ili. Alivorte temas pri la hidrargo kaj sulfuro de la filozofoj. La sulfuro kaj hidrargo interagis kaj ĉe la fino venas la morto post longa procedo de dekadenco kaj elverŝo de putra nigra likvaĵo, nomata nigredo. La pura Hidrargo de la filozofoj nun estas libera kaj trapenetas la distiladan kameron por esti kunigita kaj sekigita dum la ekstera varmo estas plialtigita. Alkemiistoj nomas ĝin la Vosto de la Pavo pro la bela sinsekvo de ĝia kolorefekto. Per eĉ pli intensa varmigo la perfekta albedo aŭ blankeco estas konvertita en la vivan ruĝan Sulfuron de la Filozofoj.

-TRIA FAZO- Renovigita aktivigo de tiuj ĉi kemiaj procedoj per pli da Ignis Innaturalis kaŭzas fermentadon kaj multobliĝon de la perfektaj elementoj. Iom post iom la plej pura koncentraĵo estas formita, la Lapis Philosophorum, la ŝtono de la filozofoj. Se la eksperimento sukcesas, ĝi devas doni tiun miraklan substancon, kiu havas la povon transmutacii metalojn malnoblajn en noblajn, kiu funkcias kiel panaceo aŭ universala medikamento por kuraci ĉiujn malsanojn kaj kiu plilongigas la homan vivon trans naturajn limojn.

KREDO ESTAS NECESA POR SUKCESO- Estas ankoraŭ unu nemalhavebla ingredienco en tiu ĉi alimaniere pure kemia recepto. Ĉiu adepto akordas, ke estas necese posedi profundan alkemian kredon, ĉerpitan el la forto de la homa spirito. Ĝi ja similas al religia kredo. Sukceso estas ebla en alkemiaj eksperimentoj nur se esploranto senkondiĉe akceptas la filozofian bazon de alkemio. Sen tiu nemateria faktoro, ne estas certeco, ke persono deziranta esti alkemiisto, progresos sen granda malfacileco pli malproksimen ol eĉ la farado de la unua reguluso, se ne paroli pri la pura blankeco de la albedo kaj ĝiaj finaj perfektaj produktaĵoj.

Bernard GOLDEN

PRI HUNDOJ

Ĉu kiu havas hundon, tiu bezonas ankaŭ vekhorloĝon? Plej ofte la amika besto venas al via lito kaj ameme lekas viajn manojn, vian vizaĝon aŭ ankaŭ mordetas vian hararon, memorado de socia konduto. Efektive, kiam la hundoj vivas are, ili "manĝas la pulojn" unu de la alia, kio substrekas la hierarkion, inhibicias agresemon kaj fortigas la ligojn inter la membroj de la grupo. Kiam iuj hundoj amindumas al hundinoj, ili mordetas iliajn hararojn. Kial la akompana besto ne montras, ĉiumatene, sian submetiĝon al la arestro, la mastro?

Kiam venas vizitanto al mia domo, ĉefe kiam temas pri konata persono, mia hundo kuras en mian studo-ĉambron kaj revenas, kun vosto moviĝanta kaj paperpeco, bonvena donaco, en la buŝo. Mi povus kalkuli la nombron da iutagaj vizitantoj nur dank'al la nombro da ĉifitaj paperpecoj mankantaj en mia paperkorbo. Ĉu Charles Darwin ne diris, ke la hundo tute speciale bonvenige ridetas? Sed kiamaniere kontroli tion tra la longa hararo?

Niaj hundoj havas ankaŭ kelkajn kutimojn pli malpli komprenatajn kaj akceptatajn de iliaj gemastroj. Kion faras la hundoj vivantaj en arbaro? Antaŭ ol dormi ili forgratas ŝtonetojn kaj branĉetojn por fari al si komfortan kuŝejon. Antaŭ ol enloĝiĝi ili rondiras por konstati, ĉu iu danĝero ŝtelatendas kaj marki per sia odoro la rifuĝejon. En la apartamento la akompana hundo turniĝas sur la tapiŝo aŭ la kuseno elektita de la mastro aŭ mastrino, kiel ĝia "lito".

Aliaj kutimoj estas multe malpli ŝatataj. La hundo, kiu sin rulas en malpuraĵoj, nur tre nature sintenas, ĉar ĝi provas kaŝi sian odoron al eventualaj malamikoj. Kiam ĝi rulas sin sur la grundo post lavado, verŝajne ĝi deziras forigi la "falsan" kaj malagrablan

odoron de la ŝampuo.

La hundoj, kiuj vivas tutlibere, tre malofte lekas siajn ĝenerajn organojn, kiel faras iliaj "urbaj" fratoj. Tiu faro estas sekuriga memorado. Kiam hundido naskiĝas, ĝia patrino lekan ĝian postaĵon por stimuli la eliminan funkciadon kaj trankviligi la etulon.

Maldece! Okazas, ke hundoj "rajdas" siajn samseksajn kunvivantojn aŭ eĉ la mastran kruron. Nur la mastro povas trovi la solvon, ĉar temas pri kompenso de manko de hundino "viro-serĉanta".

Ĉu eblas lukti kontraŭ tiuj manioj? Plej ofte ne, ĉar temas pri naturaj kutimoj, kiuj kelkfoje originas de la socia sinteno de la hundaro aŭ de kompensoj de fraŭdiĝo. Luktante kontraŭ tiuj manioj, ni instigos niajn amikojn kvarpiedajn trovi aliajn kompensojn eble pli malagrablajn.

(Laŭ artikoleto de Ch. Sacase)



La blinduloj kaj Esperanto

Kiam la 26-an de julio 1887 iu nekonata lingvo-iniciatanto, Zamenhof laŭnome, diskonigis sian multjare elpensitan prilaboraĵon, malfacilis la vivsorto de la blindulkomunumo. Post unujarcenta evoluo, ni apenaŭ imagas la statuson de homoj, kiujn Valentin Haüy estis antaŭ nelonge forpreninta, kvazaŭ forkaptinta, el la preĝejaj antaŭpordoj, eĉ foiraj placoj; de homoj, kiuj estis ĵus ricevintaj de Louis Braille taŭgan por palpo-devigatoj punktalfabeton. Pri sociala prizorgado, nenio. Pri memstareco, ĉu materiala, ĉu morala, nur revindis. Tial miron vekis la aperigita en 1881 broŝureto de Maurice de Sizeranne: "La utila blindulo". Dum 40 jaroj tiu avangardema blindulo kaj blindulbonfaranto senŝancela bataladis, por ke liaj samsortanoj konsciui pri sia homdigno kaj strebu sin vivteni, kiel la aliaj.

Ĉar blindulojn oni taksis dotitaj per aparte akra aŭdpovo, la pli lertajn oni destinis por baziĝantaj sur muziko-profesioj. Multaj ludis harmoniumon aŭ orgenon en malsanulejoj, maljunulejoj, edukejoj...kie, krom siaj labortaskoj ili neniel zorgis pri materiala vivo. Tutescepta estis Claude Montal, kiu dum siaj lernojaroj en la pariza Reĝa Instituto pruvis, ke nevidanto kapablas fariĝi fidinda piano-agordisto, eĉ piano-riparisto; kaj tia li estis en la kortego de Eŭgena imperiestrino.

Tiutempe blindaj masaĝistoj ankoraŭ ne aperis sur la labormerkato: la impulso venos pro la multnombraj okulinvalidoj dum la unua mondmilito. Malmulte enspezigaj montriĝis la klasikaj manmetioj: brosfarado, kanseĝa riparado, pajlo-kaj korboplektado, pli kaj pli endanĝerigitaj de la industria konkurenco. Kelkajn provojn ni menciu en ordinaraj presejoj sur monotipoj.

El tio evidentiĝas, ke en 1887 la blindularo estis senigita je kulturo kaj kultureblecoj, oportunoj malfermiĝi al la ekstera mondo kaj interhelpaj rimedoj. La rolon de Esperanto laŭ la supremenciitaj tri kriterioj ni esploru dank'al la movada historio ĝis la unua mondmilito.

Se la blindulmovado vere datiĝas de 1901, tamen memorindas la nomo de la unua nevidanto: la amsterdamano N. SCHILDT, kiu jam en 1888 eklernis la lingvon, sed ne sukcesis ĝin praktiki dum tiuj fruaj jaroj ĉar en lia medio neniu ankoraŭ interesiĝis pri ĝi. Pli bonŝanca estas F-ino Zabilon d'Her el Liono, kiu en 1895, dum la somerferioj, vekas interesiĝon ĉe F-ino Hélène Giroud, svisdevena instruistino, estonta direktorino de la tiam privata blindullernejo en Villeurbanne, apud Liono. H. Giroud ne nur lernas, sed siavice instruas kelkajn lernantojn kune kun sia eksinstruistino. Kaj al ŝi tiel plaĉas la lingvo, ke poste ŝi originale verkos. Sed tiumomente mankas libroj - eĉ mankas taŭga alfabeto. Tiujn gravajn mankojn, kaj samtempe la netakseblajn eblecojn de Esperanto disponigatajn al la blindulmondo, la svedo Harald Thilander antaŭperceptas la unua. Ĉar kvazaŭ eksternorma homo estas li, ni baldaŭ plezuriĝos en malkovro de liaj vivaventuro kaj agado. Sed ekde nun ni eksciui, ke la taŭgajn supersignitajn brajlliterojn elektis li; ke la unuan brajlan gazeton "Esperanto Ligilo" (E.L.) fondis, poste redaktis, eldonis kaj presis li, ho ve! tro ofte je propra kosto.

Sed ni revenu al la somero 1902-a. Estas mirige konstati, kiel okazaĵoj unuavide senrilataj povas iĝi decidaj kaj riĉaj je konsekvencoj. Tiam do la fama franca lingvofakulo Théophile Cart tute ne atendite konsciĝas pri la blindulproblemoj pro okulmalsano de sia juna filo. En septembro, dum li libertempas apud Lausanne, li diktas Esperanto lernolibron al tre fervoraj knabinoj. Sed kiel brajlighi la supersignitajn literojn? Eble estas necese klarigi, ke

en brajla sistemo supersignoj neblas, ĉar ĉiuj litertipoj devas estis samaltaj kaj egallarĝaj, por ke la fingro povu ilin rapide identigi. Cart havis la ideon ilin anstataŭigi per neuzataj en Esperanto alfabeto-literoj (q, w, y...). Sed Thilander estis jam pripensinta la problemon kaj eltrovinta ŝajne pli oportunan solvon: al la ĉi-koncernaj 5 konsonantoj, kiuj en la brajla alfabeto ne entenas la sesan punkton, li planis ties aldonon. Tiun solvon interdiskutas Cart, Thilander kaj Jacques Monnier (el Svislando); post interkonsento ili prefere alprenas la Thilander-notacion, kiun Cart diskonigas pere de 5 000 alfabetoj tut-Eŭropan kaj ekster-Eŭropan dissendataj. Ekde nun la blinduloj disponas je internacie uzbla kodo kaj baldaŭ disponos je brajlaĵoj.

Ni paŭzu momenton en la priskribo de la blindulmovadaj komenciĝoj por kliniĝi super la vivaventuro de la granda sveda pioniro, tuj poste revenonte al lia nedisigebla amiko Cart.

Ĉu mi povus elekti pli kortuŝajn enkondukajn vortojn, ol tiujn de S-ro Raymond Gonin verkitajn en aldona kajero al la gazeto "E.L.": "Karmemora apostolo de la universala kunlaborado por la plibonigo de la blindula sorto kaj de la tutmonda amikeco inter la sortofratoj".

Harald Thilander naskiĝas la 25-an de oktobro 1877. Lia patro estas modesta instruisto en paroŝlernejo. Tre juna, Harald jam avidas je scikono. En 1884 lin trafas skarlatino, timeginda malsano tiuepoke. Se la knabeto sukcesas pluvivi, li tamen perdas la vidpovon. Je la aĝo 9 jarojn li lernas la tiam instruatajn stud-objektojn, t.e... trikado kaj ŝnurfarado. Sed tial, ke lia sanstato restas malvigla, neblas, ke li eniru porblindulan internulejon. Li estas akceptata en stokholma hejmo por nekuraceblaj kripluletoj; inter ili Harald estas la nura mensnormalulo. En 1887 mortas la patro. Kaj jen li ekscias pri la brajla sistemo. Ĉu povus veni ĝojiga eklumo? Ĉu lia avido al lernado tiurimede povos kontentiĝi?

Sed lin trafas nova sorto-bato: sekve de la detru-porta skarlatino li suferas je ostoputriĝo en la manoj. Cetere lia aŭdkapablo estas grandparte difektita. Li estas sendita en infanflegejon, kie li suferas pli, ol ie ajn, ĉar en plena izoliteco li estas apartigita, kvazaŭ forlasita. Li ne plu havas emon vivi. Tamen post superhoma volostreĉo li sukcesas eviti amputadon je la maldekstra mano; pro tia miraklo li fervore dankegas al la Providenco.



Kaj rekomenciĝas la rutina vivo en la kriplulejo. Je la aĝo 18 jarojn li reeksentas sopiron al lernado. En Svedujo la blinduloj ne disponas je libroj, nur je gazetoj. Ilin li ĝue legas. Sed li ekscias, ke en la hejmlando de Louis Braille, en Francujo do, troveblas libroj. Kion fari, krom eklerni la francan? Dirite, farite. Moneron post monero li ŝparadas. Kvankam malforta estas lia aŭdpovo, kvankam difektitaj estas liaj manoj, li ekkopias, sub diktado de sindona hejmkunulo, 600-paĝan francan gramatikon, kiun li estas sukcesinta havigi al si. Sed iun tagon la hejmestrino malkovras la laborantan duopon kaj ekkoleras,

kiam ŝi estas informita pri la freneza amplekso de la entrepreno. De nun estos malpermesite pluigi la frenezaĵon. Antaŭ ol lerni fremdan lingvon, ĉu ne estus pli logike unue studi la gepatran? Ribelanta Harald ekbolas, sed post pripenso konscias, ke ŝi ja pravas: firmajn bazojn li unue bezonas. Do, ek al la laboro! Gramatikon ne plu francan, sed svedan li ekbrajl-igas. Kun la senŝancela helpo de tiu vivkunulo li 12 jarojn studas diversfake. Sed ne nur personan kulturon li celas: ankaŭ konstruan helpon al siaj samsortanoj.

Dum legado de la svedaj blindul-gazetoj li cerbumas: se ĉiuj blinduloj tra la mondo komprenus kaj uzus la saman lingvon, kiom da tempo kaj energio oni ŝparus! Kial ne alpreni la anglan, aŭ la latinan? Sed tro malfacilas ĉi-lastas.

Kaj jen li hazarde aŭdas la laŭtleĝatan unuan strofon de la Esperanto-himno. Laŭ la sonoro la teskton li taksas itala. Kaj li ekmiras, kiam oni diras, ke li eraras, ĉar ja temas pri Esperanto. Ĉu povas tiel bele soni tiu ridindigita lingvo? La arkimedan ĝojskuon li travivas, ĉar la porblindulan taŭgan komunikilon li estas trafinta. En fervorego li lernadas. Sed ne sufiĉas jam: Esperanton li 10 jarojn diskonigas ne nur en ĉiuspecaj blindul-gazetoj, sed laŭlonge de porvidulaj gazetkolumnoj, en Anglujo, en Francujo, helpate de Cart. Ni konsterniĝas, kiam ni konscias pri la laborkvanto, kiun tiu korpa malviglulo, sed nevenkebla forto-volulo sukcesas plenumi. En 1912 li transprenas la redaktadon de "Esperanta Ligilo".

Cetere al memstareco li sopiras. Li decidas rezigni pri la kripluleja sekureco por vivi en propra loĝejo. La horizonto heliĝas. Lin helpas samideanino Karin Hoejer, muzikinstruistino. Spite la malaprobos de la familianoj ili poste geedziĝas kaj ĝuos feliĉon, ho ve! tro mallongan pro la frua morto de Karin (1927).

Monajn subtenojn li investas en aĉeto de stereotip-maŝino kaj presilo kaj li publikigas esperantlingvajn literaturaĵojn. Poste li respondecas pri la porblindula sveda

revuo. Neniam li senkuraĝiĝas: nek dum la milito, nek post la morto de la edzinjo. Al li venos dua, ĉi-foje el Finnlando. Kortuŝitaj vizitantoj raportas, ke, ĉar li estas plene perdinta la aŭdpovon, tiu ĉarma sindonema Varma kutimas skribi en lian manon la frazojn elparolitajn de la ĉeestantoj, por ke li povu partopreni la konversacion.

Dank'al monsubteno el Usono li en 1935 eldonas grandformatan popularsciencan revuon kun reliefaj ilustraĵoj sub la titolo "Nia mondo". Sed ree, dum la dua mondmilito la gazetoj mutas en tristo.



Harald Thilander.

Tri monatojn antaŭ ol li mortos (1958), li transdonas la respondecon de "Esperanta Ligilo" al Raymond Gonin.

Por pli komplete analizi lian personecon ni ne preteratentu la milojn da leteroj tra la tutmonda blindularo de li dissenditaj por informi, kuraĝigi, helpi eĉ konsoli. Multajn honor-signojn li ricevis, sed kun humileco, neniam sin glorante.

Ĉu ne estas homo tia la viva ilustraĵo de niaj supre menciitaj tri kriterioj?

(Daŭrigota)

Simone BONIOL

S-ro Lernejestro

Longaj pianisto-fingroj ritme marteladas la fenestrajn vitrojn, kiuuj, pro la sekiĝo de la lignaĵo kaj de la mastiko, propratone vibras. S-ro Estro de la Mezlernejo, trarigardante la fenestron de sia oficejo, ludas marŝo-muzikon. Poste li ekludas, impetege, novan usonan muzikaĵon, kiun multaj orkestroj uverture interpretas en siaj spektakloj.

Aŭguste, matene. S-ro Lernejestro demetis sian brunan jakon. Lia miopa rigardo vagadas sur la honor-korto, tra nazumo sekure tenata per nigra kordono. Dum tiu unua somera libertago, silento tute nova ekkaptis la lernejon; estas pli facile ĝui la ĉarmon de la verdaj gazonbedoj plibeligitaj de daliaj kaj begonioj.

S-ro Lernejestro fieras; kiam li alvenis en tiu urbeto de okcidenta Francio, rutina urbestro pretekstis, ke la pordisto devis esti ĉionfara, inklude de la prizorgado de la honor-korto. Malfeliĉa, superŝutita pordisto! La ridetanta aŭtoritato de la nova lernejestro venkis kaj nun la ĝardenisto de la urba parko zorgas, du aŭ tri foje en la jaro, pri la aranĝo de la florbudoj. La pordisto, krom la prizorgado de la hejtiloj, la balaado de la kortoj, koridoroj, klasĉambroj, la disportado de la estraj mesaĝoj, trovu tempon por akvumi la plantojn kaj detruĝi la malpermesitajn herbaĉojn!

S-ro Lernejestro fieras ankaŭ pro la gratuloj esprimitaj de la Akademia Inspektoro la antaŭan tagon: en tiu urbeto, kie regas potenca Religia Lernejo la nombro da gelernantoj en la laika lernejo kreskis je 25% en la lastaj du jaroj. Eĉ la Departementa Konsiliano intencas registri sian filon, kiu ne bone sukcesis en la apuda departementa ĉefurbo. Kaj...ĉu, ne oficiale kompreneble, oni ne flusuris, ke venontjare la jako de la lernejestro

riĉiĝos je bela orden-rubando.

S-ro Lernejestro fieras! Iel grandaj estas jam la atingoj, ke tute ne oportune estas kandidatiĝi al la posteno de estro de la mezlernejo en Brive. Kial Brive? Ĉar le edzino de s-ro Lernejestro daŭre sopiras pri sia naskiĝ-regiono; ŝi preferas la montetojn de Limuzo ol la ebenaĵo, kiu ĉirkaŭas la ne tre akceptema urbeto, kie la paro alvenis antaŭ du jaroj. Plie, obee al la tradicio, la edzino de la lernejestro estas devigata akompani la junajn internulojn al la katolika diservo, kvankam, pro la konvinkiĝoj de sia patro, ŝi ne estis kondukita al la baptejo. Ripetade ŝi diras al sia edzo, ke certe facile estus ricevi la estradon de la granda mezlernejo de Brive. Denove, ĉi matene, pri tio kverelis la geedzoj. Pro tio s-ro Lernejestro rifuĝis en sian oficejon dum lia edzino paŭzas!

Brive? Ne! Ĉar granda estas la laboro farota en tiu ĉi urbeto, kie loĝas la episkopo kaj, konsekvence kie la religiaj lernejoj floras. La grava kverelo de la dispartigo de la ŝtato disde la katolika potenco ankoraŭ ŝvebas. S-ro Lernejestro sentas sin sufiĉe "diplomata" por komprenigi la vidpunkton de la ŝtata lernejo kaj labori favore al nereligia instruado. Brive?.... Ne! Decido definitiva!

S-ro Lernejestro nun fajfetas kelkajn mezurojn de la "Bela Blua danubo". La dolĉa valso tute prenas lin dum li ame rigardas sian blondan filineton, jam kvinjara, kiu ludas per rulringo en la korto....

Jen alvenas Adrien, la pordisto, lamanta tra la honor-korto, viŝanta siajn manojn per sia antaŭtuko. S-ro Lernejestro iom incitetiĝas sed rapide kvietigiĝas: verŝajne Adrien anoncos viziton kaj vizito signifas enlistigon de plia lernanto. S-ro Lernejestro surmetas sian jakon. La silueto de Adrien aperas en la aperturo: "Virino venas por enlistigo de knabeto...la edzino

de la nova poŝtoficestro". S-ro Lernejestro eksidas en sian fotelon, disŝutas kelkajn ieterojn sur la skribotablo, viŝas la plumon de sia skribilo per tiucela broseto kaj surprenas mienon de tre okupata persono. Frapon ĉe la pordo! S-ro Lernejestro ekstaras, ĵetas rigardon al la vizitantoj, ankoraŭ juna virino kaj knabeto; per afabla gesto li montras al ili fotelojn kaj revenas al sia tablo, kvazaŭ li havus ion plian por skribi. Poste li levas sian kapon, demand-ridetante. Sed la virinon, kies vizaĝo kaŝiĝas malantaŭ vualeto, aspektas ŝtoniĝinta; ŝi malrapide levas la fajnan broditan tulon; nun ankaŭ s-ro Lernejestro stoniĝas...Li provas reirovi datojn, kalkuli; sed lia konfuzita menso ne kapablas kapti fuĝantajn ideojn. Brive. Tie li estis juna fakinstruisto pri filozofio antaŭ deko da jaroj; tie li ekkonis junan beletan kudristinon; li eĉ intime konis ŝin. La tagon, kiam ŝi anoncis al li lian baldaŭan patriĝon, li ricevis informon, ke li estas sendira al alia urbo, cent kilometrojn for. Li foriris... kaj forgesis.

Ĉu eblas?... Lia duonfreneziga rigardo demandas..."Jes", respondas la beleta sensava vizaĝo de la sinjorino. Post momento s-ro Lernejestro malrapide stariĝas; li prenas la manon de la knabeto kaj kondukas lin ĝis la honor-korto.

Rigide staranta piede de la perono, profunde malserena pro tio, kion li sentas. Jam li ofte suferis pro la malagrabra scivolemo de homoj kontraŭ li. En la vilaĝo, kie li vivis kun anjo, kiam patrino laboris en la apuda urbeto...Poste, kiam dimanĉe venis panjo kun "paĉjo", kiu rigardis lin konfuzige. Jen naskiĝis frateto, kiu loĝis kun panjo kaj "paĉjo" en la urbo. Dume, li estis devigata restadi en alia loko, internulo ĉe la Fratoj. Kial la lernejestro kondukis lin al tiu korto, karesante lian hararon?... Kial tiu blondulineto, kiu ludis per rulringo grimacas al li? Li emas plori...

Subite staras apud li panjo, protekta, trankviliga; ŝi mallevis sian vizaĝ-vualeton kaj iam klinas sian kapon; ŝi prenas la manon de sia filo, eble pli ameme ol kutime... Staranta ĉe la pordo, s-ro Lernejestro, seriozvizaĝe, svage gestas, senkonsola, al la forirantoj.

En la ne bone spegulanta fenestro-vitraĵo, s-ro Lernejestro provas kapti la fuĝantajn trajtojn de sia malpreciza vizaĝo. Li eĉ ne pensas demeti sian jakon kvankam ŝvito perle glitas sur lia korpo. Li ne plu emas ritme ludi per la fingroj marŝo-muzikon. Li sentas sin falanta en abismon... Brive. Li volis forgesi. Li eĉ rifuzis aŭdi la nomon "Brive". Sed nun la kaŭzo de tiu rifuzo venis al li. La malfieriga memoro fariĝos ĉi utaga realaĵo. Do...

Post longa tempo s-ro Lernejestro peze sidiĝas ĉe sia skribotablo kaj prenas paperfolion. Li frotas la plumon sur la broseto kaj skribas: "Sinjoro Ministro, mi havas la honoron peti de via Moŝto la permeson kandidati...en Brive..."Ĉi vespere la edzino pensos, ke ŝi havas edzon ege afablan, kiu, pro amo al ŝi, fine konsentis plenumi ŝian deziron.

E.B.



POR

VIA DISTRO

Anagramoj: Genro, Greno, Negro, negro.
Demono, Monedo.
Merino, Rimeno.

Ŝak-enigmo: La frazoj, kiuj estis kaŝitaj en la ŝak-tabulo de silaboj kaj kiujn oni trovis laŭ la movo de "ĉevalo" estas: li havas pli da ŝuldoj en la urbo, ol da haroj en la barbo. Naskiĝu, edziĝu kaj mortu, ĉiam monon alportu.

Dispecigitaj vortoj: La frazo de Zamenhof kiun oni povis rekonstrui estis: Komenciĝis proceso, mono fluas sen ĉeso.

Enigmoj: Oni devis retrovi la jenajn vortojn: Barito, bato - Fuliko, fuko - Nababo, nabo - Kodako, koko - Butiko, buko

NOVA PROBLEMO

	A	B	C	D	E	F	G	H	I	J	K
1					■		■				
2				■				■			
3			■						■		
4		■								■	
5	■										■
6											
7	■										■
8		■								■	
9			■						■		
10				■				■			
11					■		■				

(R) signifas : nur radiko.

Horizontale

1. Detala tabelo (R); Celtrafo (R). — 2. Aro da du samspecaj objektoj (R); Aperturo en tegmento (R); Seksa sufikso. — 3. Multvalora metalo (R); Mortiga infekta malsano; Fonetike : ronda elstarajo ĉirkaŭ kolono. — 4. Fabela estaĵo. — 5. Alta herbo el familio de gramenacoj (R); Por ĝin havi necesas kokino. — 6. Scienco pri la regado de la aŭtomataj organismoj. — 7. Nombro; Participa finaĵo. — 8. Japana poemeto (R). — 9. Pronomo; malhelpi ĉian komunikon; Peceto (R). — 10. Papago (R); Motiĝo de iu loko al alia; Ege. — 11. Sakforma provizejo por konservi grenon; Muzikilo (R).

Vertikale

A. Rakonta poezio (R); Korta naĝbirdo (R). — B. Pezo de ĉiu speca envolvo (R); Tuŝi per la lipoj (R); Moviĝi al iu loko. — C. Grupo, amaso (R); Fantazia rakonto (R); Ĉiu ekstrema parto de heliko (R). — D. Filo de la filo (R). — E. Varmega elfluajo el vulkano (R); Utiligi. — F. Administranto de provinco. — G. Demanda pronomo por neŭtraĵoj; Vegetaĵo kies rezino estas laksiga (R). — H. Participa finaĵo. — I. Interjekcio esprimanta malestimon; Peni ne renkonti iun; Loka adverbo (R). — J. Participa finaĵo (R); De numeralo; Tempokalkulo (R). — K. Centro de sangocirkulado; Kapti ion (R).

LA VIVO EN GRESILLON

Ĉi sube vi legos ege belan tekston de Nelly Starck. Kiam ni ricevis ĝin, originale verkitan en la franca lingvo, ni tuj deziris publikigi ĝin en la esperanta. La tradukon prizorgis J.A. Rousseau kaj A. Cherpillod. Dankon al ili.

EN LA LANDO DE DU BELLAY

En Anĵuo, ne malproksime de la rivero Lûaro kun prestiĝa estinteco, mi konas kastelon, ekaperantan el la fabeloj de mia infanaĝo. De la vojo, vi ne povas ekvidi ĝin, kvazaŭ kaŝitan malantaŭ ĝiaj muroj de verdaĵoj. Du taksusoj staras ĉe la enirejo. Ambaŭflanke de la ĉefa aleo, la linioj de poploj salutas vin pasantan. Du plorsalikoj sopirĝemas apud dormanta akvo. La bluetaj cedroj susuras sub la kareso de la frumatena venteto.

Foje, kiam vesperiĝas, mil muzikoj sin levas kiel simfonio simila al neniuj aliaj, laŭ la ŝveliĝo aŭ kvietiĝo de la ventoj. La akacioj, la katalpoj, la ulmoj, la hipokaŝtanarboj kaj eĉ la malnova tilio, ĉiuj kantas.

La subarbejoj odoras je avelo. La senbrida vegetaĵo sterniĝas per mil odoraj volvaĵoj, ene de kiuj agitiĝas bruetanta kaj zumanta mondo de insektoj. La sciuroj grimpas ĝis la supro de la grandaj arboj. La sitoj imitas ilin, aldonante siajn tiel specialajn rekantaĵojn. La turtoj kaj la palumoj, sidantaj sur alta branĉo, flustras ian dolĉan konfidon.

Kiam noktiĝas, la pejzaĝo rigidiĝas dum kelke da tempo. Dise ŝprucas angoraj alvokoj: la noktuo, reĝoj de l'nokto, vekigiĝas. Per silenta flugado, ili forlasas sian ŝirmejon, pretaj ĉasadi. Ili ululadoj dronigos la parkon en senvigliĝon preskaŭ similan al envulto. La sirnioj, gardistoj de l'kastelo, ĉeestas kaj noktogardas.

Sed jam, oriente, griza aŭroro malrapide sterniĝas. Nova tago leviĝas super Grezijono...

Dum tiu somero de 1991, ĉiuj estis alvenintaj de diversaj horizontoj, de Oriento kaj de Okcidento. Inter ili, viroj, virinoj, infanoj; iuj junaj, aliaj maljunaj. Ĉiuj rendezvis en Grezijono. Ĉiuj havis en sia poŝo unu ŝlosilon: Esperanto. Ili sciis, ke tiu ŝlosilo ebligas la malfermon de ĉiuj komunikaj pordoj. Venintaj de Japanio, Sardinio, Pollando, Britio... ĉiuj sciis, ke ili povos kune ŝerci, filozofumi, sin ami, amuziĝi, dank'al lingvo unu, de ĉiuj komprenata, unu lingvo internacia, kiu teksos inter ili amikecajn ligilojn elprovitajn.

Kaj subite, ekestis Septembro. Jam ne plu estis somero, sed ankoraŭ ne aŭtuno. Laŭlonge de la tagoj, la aro de la esperantistoj malgrandiĝis. Ĉiu reprenis sian valizon kaj reveturis, trans la urbojn, trans la marojn.

Venis mia vico. Tro rapide pasis tiu lasta tago. Vesperiĝis. Mi sidiĝis sur la benko, sub la tilio. Kun kelkaj amikoj, ni gaje babilis. Subite tintis la sonorilo de Sankta-Marteno, kiel ĉiun tagon je la sama horo. Ĝia voĉo atingis min, intermite, proksima aŭ malproksima, laŭ la kapricoj de l'vento. Kaj ĝi silentis. Tiam, en la vespera kvieto, revenis en mian memoron versoj de soneto de Du Bellay:

Ve, kiam mian etan revidos mi vilaĝon
 Kun la kamen' fumanta, en kia tag', trankvila.
 Revidos mi la korton de mia dom' humila...?
 ...Pli ol marmor' severa l'ardezo fajne blua,
 ...Pli mia Liréeto, ol monto Palatina,
 Kaj pli ol maraero, tiu mildec' Anĵua.

(Trad. Gaston Waringhien)

Du Bellay, mia olda Du Bellay, vi mortinta antaŭ pli ol kvarcent jaroj, ĉu vi scias, ke viaj poemoj transpasis la jarcentojn? Ĉu vi scias, ke viaj versoj lulis mian infanaĝon? Du Bellay, dormu poreterne en tiel bela pejzaĝo de dolĉa Anĵuo.

Pasos la tempo...Vi venas al mia imago, ho Grezijono, dum la vintra sezono. Ĉezertas la salono, kie la planko memoras ankoraŭ la paŝojn, kiuj tretis ĝin pasintsomere. Senvoĉas la piano, kiun tuŝetis la lertaj fingroj de Izabela ludanta la notojn de nokturno de Chopin. Fermitas la libro de Raymond, la soleculo, kiu ŝatis sidadon en la ombro de la tilio. Svenintas la rido de Etsuko, kies japana nomo signifas "gaja infano". Ŝi ne parolis mian lingvon, mi ne parolis la ŝian, kaj tamen dank'al Esperanto ni interkomprenis nin tiel bone. Iun septembran matenon, eta Etsuko, vi ekflugis al via mistera Japanio. Mi konservas profunde en mi, kvazaŭ eĥon, vian ridon, kiun mi neniam forgesos.

Pasas ankoraŭ tempo...Jam vintro estas for. La junaj folioj tremetas en la aprila hela vento. La birdoj retrovis sian voĉon. De aŭroro ĝis krepusko, ili prikantas la vivĝojn. Baldaŭ la ŝutroj de Grezijono malfermiĝos antaŭ printempo tute nova, naturo feste ĝojega. Tiam, kun Apollinaire, mia inter ĉiuj amata poeto, mi diras: "revenu la paska suno..."

Nelly STARCK

LIBRO-SERVO

Povas okazi, ke via mendo de libroj aŭ via aliĝo al perkoresponda kurso ne estas pritraktita en deca tempo-daŭro. Ne ĉiam ni kulpas. Per grandparte eviti tiajn malagrablaĵojn aldonu sur la koverto la jenon: "Libro-Servo", aŭ "Perkoresponda kurso" aŭ "Programo". Se, en la sama letero, vi mendas librojn kaj aliĝas al kurso aŭ al stud-periodo kaj... bonvolu pritrakti ĉiun aferon en aparta paragrafo. Kiam vi sendas ĉekon ne forgesu skribi la kialo(j)n de la pago. Dankon.

ĜUS APERIS

la 5-a eldono de " Por la Praktikantoj ", studlibro uzata en pli ol dek landoj. Prezo: 35 francs

Favora prezo por pogranda mendo.

« KULTURAJ KAJEROJ »

regule atingos vin

se vi

tuj reabonas




GRAMATIKO PER BONHUMORO


« Ĉu ... ĉu : uzota en senco demanda ;
ankàu en la senco de necer-
teco aù de dubo.

jen ... jen : signifas « iufoje ... alifoj ».

aù ... aù : montras alternativon ».



— Aù vi pagas al mi tiun katpeltan ĉapelon,
aù vi ne plu havos edzinon.



— Li ne povis decidiĝi, ĉu legi, ĉu manĝi.



— Mi povos jen rigardi la eksteron, jen
akcepti la eksteron ĉe mi.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).

Belgio : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — Exeter, EX 4 6 JT (7,50 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (87 kronoj).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (65 mk.).

Germanujo Okc. : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609).

Hispanio : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10^e-D 03003 ALICANTE - (1 400 peset).

Italio : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foiro (190.000 lir.).

Japanio : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôziŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).

Jugoslavio : Jugoslavia Stelo, D. Ozme 7/IV, 71000 Sarajevo.

Nederlando : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (25 fl.).

Nov-Zelando : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 16 n.z.dol).

Pollando : Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (15 us. dol.).

Portugaliao : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboâ.

Svedujo : Sveda Esperanto-Asocio, Södra Rörum, pl. 455, S-242 94 Hörby - p.k. : 2012-3 (70 kr.).

Svislando : Kultura Centro Esperantista poŝtfako 771. LA CHAUX-DE-FONDS - p.k. : 23-2921 La Chaux-de-Fonds (20 frs).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ

Maine-et-Loire

FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempoj ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34